

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gill Noria, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 167
25. 11. 1923

Redakcio:

Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei K81n, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldona
al ĉiu specimena kaj unua numero
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La Preparoj por la Deksesa.

Esperanto-Ekspozicio en la Foirpalaco de Wien. — La Respublika Prezidanto s-o Hainisch mem vizitas la Ekspozicion.

Kvazaŭ prologo por la XVI-a Unversala Kongreso okazis en la Foirpalaco de Wien de 21. ĝis 30. septembro Esperanto-ekspozicio, kiu estis rimarkinda ne nur pro ĝia bona aranĝo kaj relativa kompleteco, sed ankaŭ pro la fakto, ke tre eminentaj personoj aniĝis al ĝia honora komitato, kaj ke i. a. la Prezidanto de la Respubliko, s-o Hainisch, mem vizitis ĝin.

Publiko kaj gazetaro montris grandan intereson pri la ekspozicio, kiu estis certe faŭlga komenco en la preparoj por la XVI-a.

Ci-sekvante ni publikigas la nomojn de la anoj de l' honora komitato, la nomojn de la organizintoj kaj kunlaborintoj, la programon de la ekspozicio kaj elirojn el la raportoj de kelkaj ĵurnaloj.

Honora Komitato.

Reg. kons. Rudolf Barta, direktoro de la komerca akademio.

Kom. kons. Hans Bösbauer, ĉefredaktoro, prezidanto de Zentralverein der Zeitungsunternehmungen (centra unuiĝo de gazet-entreprenoj).

D-ro Oskar Dressler, korta konsilanto de la polica direkto.

Ŝtata kons. Georg Emmerling, vicurbestro de Wien.

Korta kons. Otto Glöckl, prezidanto de la urba lerneja konsilantaro.

Reg. kons. Leopold Goldberger, direktoro de la nova komerca akademio.

Rudolf Goldscheid, verkisto.

Reg. kons. Adolf Hess, ministeria inspektoro por meti-lernejoj.

Kom. kons. Ernst Hochmuth, prezidanto de Wiener Messe A.-G. (Wien-a Foiro Akcia Societo).

Sekciestro Konrad Hoheisel, ĝen. direktoro de Poŝto.

Reg. kons. Wilhelm Jähnl, sekciestro en la komerca ministerio.

Reg. kons. D-ro Karl Wilh. Kammel, gazetestro-anstataŭanto en la ŝtata kancelario.

Kom. kons. Ludwig Lampel, prezidanto de la korporacio de komercaj agentoj.

D-ro Julius Lasniczek, prezidanto de la ŝtata fervoja direkto por nordoriento.

D-ro Emil Mayrle, ministeria konsilanto.

D-ro Arnold Minibek, sekcia konsilanto en la komerca ministerio.

Prof. Anton Muhr, direktoro de la komerca akademio de la komercistaro de Wien.

Landa lerneja inspektoro D-ro Rudolf Ortman, korta konsilanto en la ministerio por kulto kaj instruo.

D-ro J. Robinson, ĉef-ortogenologo.

Komerca kons. Heinrich Rosenberg, korporacia konsilanto.

Lerneja kons. Leopold Scheuch, landa lerneja inspektoro.

Sekreta kons. D-ro Franz Schonka, eks-sekciestro, prezidanto de Donau-Dampfschiffahrtsgesellschaft (Danuba Ŝipvetura Societo).

Korta kons. D-ro Richard Schumann, profesoro de la teknika altlernejo.

ing. Ludwig Spängler, direktoro de la urbaj tramvojoj.

Landa kapitano Leopold Steiner, prezidanto de la landa unuiĝo por fremdultrafiko.

Kom. kons. Ludwig Urban jun., prezidanto de Hauptverband der Industrie Oesterreichs (ĉefa ligo de la industrio de Aŭstrio).

Marie Wettstein, ĝen. sek. de la internacia virina ligo.



Rigardo en parton de la ekspozicio.

Ĉe la tablo sidas: 1. O. Zimmermann, prezidanto de la Esp. Delegitaro de Wien; 2. K. O. Sikor, prezidanto de la Asocio por Komercio kaj Helplingvo Tutmonde en Wien; 3. Franz J. Schade, ĉefsekretario de la Aŭstria Esperanto-Delegitaro.

Korta kons. D-ro Franz Wollmann, landa lerneja inspektoro.

M. Wortmann, ĝen. sek. de Wiener Freiwillige Rettungsgesellschaft (sanitara volontularo).

Organizintoj:

Aŭstria Esperanto-Delegitaro. Oficejo: Wien VI, Mollardgasse 55—57.

Estro de la ekspozicio:

Prokuristo Franz J. Schade, ĝen. sekretario de la Aŭstria Esperanto-Delegitaro.

Estroj

de la fakgrupoj kaj kunlaborintoj:

R. A. Ĉech — Franz Jonas — Adalbert Klättil — Karl Otto Sikor — J. Slezak — Walter Smital — Dr. Edmund Sós — Emil Schade — Regiona inspektoro G. Stanislawsky — Franz Vasta — Karl Wessely — Oskar Zimmermann — Kolo-nelo Franz Zwach.

Programo de la ekspozicio.

21. sept. 11.30 h. malfermo antaŭ invititaj honor-gastoj.
22. sept. depost 18 h. paroladoj por laboristoj.
23. sept. 11—17 h. ĝeneralaj paroladoj.
24. sept. 18 h. paroladoj por trafikgrupoj (polico, poŝto, tramvojo, fervojo).
25. sept. 18 h. paroladoj por katolikoj.
26. sept. 18 h. paroladoj por komercistoj.
27. sept. 18 h. paroladoj por ĉeĥoj.
28. sept. 18 h. paroladoj por kultursocietoj (pacifistoj, virinaj unuiĝoj, bontemplanoj ktp.).
29. sept. 18 h. paroladoj por instruistoj.
30. sept. 11—16 h. ĝeneralaj paroladoj. — 18 h. fermo.

Eltiraĵoj el raportoj de la gazetaro.

Neuigkeits-Weltblatt, 25. sept.

Wien povos en venonta somero dokumenti sian bone merititan famon kiel internacia urbo en speciala maniero. La ponto de la interpopola kompreno, kiun prezentas al la scienco la internacia interkomunika lingvo Esperanto en sia multflanka aplikeblo, havas ĉi tie fortikan foston. Sur ĝin volas sin apogi la Esperantistaro de la tuta mondo, elektinte nian urbon kiel lokon de la

proksima internacia kongreso. La prologo por tio estas la Esperanto-ekspozicio malfermita hieraŭ en la foirpalaco.

Je la angulo de Burggasse, kontraŭ la Germana Popola Teatro, du flagoj apud la pordego de la iama „Hofstall“-konstruaĵo — unu ruĝa-blanka-ruĝa kaj unu verda kun kvinpinta verda stelo en blanka kvadrata angulkampo —, flankantaj tabulon kun surskribo, montras la enirejon al la Esperanto-ekspozicio, kiu — instalita en vico da foirstandoj — invitas al rondirado.

Ĉar la ekspozicio estas dononta supervideblan bildon pri la evoluo, historio, disvastigiteco kaj signifo de lingvo, la materialo konsistas preskaŭ nur el presaĵoj, kaj la vizitanto, volante profiti de la ekspozicio, devas direkti sian atenton je detalaĵoj, kiuj tie estas ekspozitaj por ĝenerala rigardado.

El kartoj, tabeloj, bildoj, broŝuroj, flugfolioj oni vidas unue laŭvice la partoprenon de la unuopaj landoj en la propagando kaj disvastigo de la neŭtrala artefarita mondinterkomunika lingvo, kies kreinto — la mortinta dum la mondmilito en Warszawa rusa okulkuracisto D-ro L. Zamenhof — salutis

vin per bone farita busto kaj granda portreto.

La duan parton formas la ekspozitaĵoj de la diversaj en Wien ekzistantaj partio politikaj, fakaj, naciaj aŭ religiaj organizaĵoj por disvastigo kaj aplikado de la lingvo. Kelkloke ĉi tie la disvastigo tra la tuta mondo evidentiĝas per riĉaj kolektoj de ilustritaj poŝtkartoj, kiujn la membroj dankas al sia korespondanto en tiu unusola lingvo kun samideanoj el la plej diversaj nacioj de ĉiuj kvin terpartoj.

La tria parto vidigas la sukcesojn de la instruado, la instrumentodon kaj la lernilojn de la lingvo, kiu estas lernebla por ĉiu lerneja instruisto de ĉiu aĝo kaj sekso en kursoj relative mallongaj aŭ per meminstruo nekompareble pli rapide ol iu ajn el la naturaj lingvoj.

La kvaran kaj finan parton formas kolektoj de eldonaĵoj de la plej grandaj aŭstraj kaj germanaj libro-eldonejoj sur tiu ĉi kampo kaj de la centroj por Esperanto en Wien VI, Mollardgasse 55.

La ekspozicio, kies celo estas vekti intereson por la mondhelpinga lingvo kaj por la vizito al unu el la kursoj en tiu ĉi lingvo malfermitaj post nelonge en ĉiuj regionoj de Wien, estas la verko de la delegitaro de l' 26 Esp. unuiĝoj ekzistantaj en Wien kaj bonege preparita de la ĝenerala sekretario de tiu ĉi delegitaro, prokuristo Franz J. Schade, kiu stabo de kunlaborantoj.

La hieraŭan malfermon ĉestis la invititaj reprezentantoj de la instrua ministerio kaj de la urba konsilantaro de Wien, de la fervojoj, de l' polico, de la komercaj rondoj kaj de la gazetaro. Ili estis salutataj de l' prezidanto de la delegitaro s-o Oskar Zimmermann. Poste s-o Schade klarigis la celon de la ekspozicio kaj donis ankaŭ la necesajn klarigojn dum la rondirado.

Ankaŭ la ŝtata prezidanto D-ro Hainisch kaj la polica prezidanto Schober promesis viziti la ekspozicion, por informiĝi propraokule pri la mondhelpingva movado sur la diversaj kampoj.

Al la lernejoj de Wien oni povas tre rekomendi viziton al la ekspozicio, kiu estas senpaga ĉiutage jam de 9 h.

Pli-malpli frue la grandiganta gejunularo ja devos okupi sin je sia propra profito pri „la dua lingvo apud la gepatra lingvo“.

Ke en Wien la intereso por la Esp. movado nun pligrandigis en pli vastaj rondoj, evidentiĝas el la fakto, ke tuta vico de personoj el diversaj

sferoj aliĝis al la honora komitato de la Esp. ekspozicio . . . , tiumaniere akcelante la reputacion de la movado.

Jen bonegaj aŭspicioj por la XVI-a Esp. Mondkongreso en Vien 1924!

Volkszeitung, 26. sept.

Hieraŭ antaŭtagmeze ŝtata prezidanto Hainisch, akompanite de sekciestro D-ro Löwenthal, vizitis la Esp. ekspozicion. Li estis salutata de la honora prezidanto de la Unua Vienna Esp. Unuiĝo, korta konsilanto ing. Ferd. Hartwich. La estro de la ekspozicio, prokuristo F. J. Schade, post enkondukaj vortoj gvidis la prezidanton tra la diversaj fakoj. La prezidanto estis surprizita de la riĉa enhavo de l' ekspozicio kaj de la multfoje praktika aplikado de Esperanto kaj gratis la Esperantistojn pro la belaj sukcesoj, kiuj (li akcentis) bedaŭrinde estas ankoraŭ tro malmulte konataj en la publiko.

Preskaŭ egaltekstan raporton enhavis Wiener Handelsblatt de 1. oktobro.

Neues 8-Uhr-Abendblatt, 22. sept.

Esperanto — lingvo — kion do volas ekspozici tiuj homoj? Certe mi ne estis la sola, kiu faris al si tiun ĉi demandon, vidante la verdan stelon. Sed oni miras, agrable surprizite, kiam oni rigardante promenas tra la ejoj de la ekspozicio: la Esperantistoj havas ion por montri. Kaj ili faras tion kun tiom da amo al la afero, ke el ĉiuj la malgrandaj bildoj, kiujn ili tie kunmetis, volite kaj tamen senkonscie fariĝis la pli granda bildo de evoluado.

Reichspost, 22. sept.

La ekspozicio estas kunmetita kun granda diligenteco, kaj vizito al ĝi estis rekomendinda ankaŭ al neesperantistoj. El la multeco de la ekspoziciitoj ili povas konvinkiĝi, ke la Esperantomovado, kiuj multajn, multajn ĉiujn iris sur dorpenlajn vojoj kaj devis lukti malfacilan kaj preskaŭ senŝancon batalon kontraŭ la nekomprenejo de la amaso, nun eniras la stadion de l' rikolto. La kontraŭuloj de la Esp. movado malmultigis ĝis apenaŭ konsiderinda areto. La plej aŭtoritataj lokoj en multaj landoj favoras ĝin. Nun, kiam ĝi iras el la stadio de l' batalo en la stadion de l' rekonno, ĝi certe rapide kaj potence progresos.

La ekspozicio perfekte plenumis sian celon, evidentiĝi al la Vien'anoj la kulturen kaj praktikan signifon de Esperanto, kaj alkondukos al la movado multajn novajn amikojn.

Ĝuste hodiaŭ la aŭstria Esp. delegitaro ricevis la komunikon, ke ĝia deziro, havi la proksiman Esp. mondkongreson en Vien, estas plenumita. Do, en venonta jaro Wien estos la loko, kie la Esp. unuiĝoj de ĉiuj landoj kunvenos por la XVI-a mondkongreso. Tiu ĉi komunikilo estis akceptata de la gastoj, kiuj ĉeestis la malfermon de la ekspozicio, kun granda ĝojo.

Similajn favorajn raportojn pri la ekspozicio enhavis sekvantaj gazetoj:

ABC des Kaufmanns (komerca revuo) de 15. 9., Der Abend, 22. 9., Deutsch-öst. Tageszeitung, 4. 10., Die Neue Zeitung, 22. kaj 26. 9., Illustr. Wiener Extrablatt, 4. 10., Neue Freie Presse, 26. 9., Neues Wiener Tagblatt, 26. 9. kaj 4. 10., Wiener Morgenzeitung, 4. 10.

Arta vivo.

Trovo de unu „Giorgione“.

De H. Moser.

El Londono venas sciigo de arta trovaĵo el la tempo de la renesanco, kiu certe estos taŭga, ĝoje eksciti la tutan aron de l' artistoj, artikonantoj kaj artamikoj.

Temas pri eltrovo de forgesita pentraĵo de l' mond fama bildo „Il Concerto“ de Giorgione Barbarelli (1477—1510) nomita en la arto „Giorgione del Castelfranco“ aŭ nur „Giorgione“.

Kion ĝis nun ni komprenis pri la nomo „Concerto del Giorgione“ estas bildo kun tiu nomo, videbla en la palaco Pitti en FIRENZE (Italujo). Tie ĝi ne pendas sur unu el la kvar grandaj salonomuroj, sed escepte, kiel la „Madonna della sedia“ de Raffaello, ĉe finfosto de transversa muro, pendante tiamaniere en la longan koridoron, kaj ĝi estas turnebla, por ke la observanto povu lokigi ĝin ĉiutempe en la ĝustan lumon kaj ĝi trankvile la ensorĉantan belecon de l' koloroj.

La nove eltrovita „Concerto“ devenas, kiel oni konstatas laŭ pruvoj, el la fama kolekto de l' duko Henriko d'Orléans, posta reĝo de Francujo kaj edzo de Katarino de Medici. Laŭdokumente estas pruvite ke la bildo ses fojojn ŝanĝis sian posedanton. Antaŭ 150 jaroj ĝi troviĝis en la pentraĵgalerio de Earl of Kinnoull en la kastelo Dupplin en Skotlando.

En la jaro 1842, okaze de la aŭkcio de Christie's ĝi estis vendita en Londono je prezo pli alta ol

Dělnické Listy, la organo de la ĉeĥoslovaka social-demokrata partio en Aŭstrio (kiu cetere ĉiumarde enhavas specialan Esperanto-angulon) publikigis longan artikolon pri la ekspozicio en Esperanto (numero de 18. sept.) kaj aliajn artikolojn pri la sama temo en la numeroj de 11., 20., 25. kaj 26. 9.

De eksterlandaj gazetoj raportintaj pri la ekspozicio ni ricevis du numerojn (de 20. kaj 21. 9.) de la hungara ĵurnalo Bécsi Magyar Ujság en Bécs.

Resume kaj ripete, la Esperanto-ekspozicio en Vien estis taŭga komenco en la preparoj por la Deksesa. Pro ĝia laŭcela aranĝo kaj bona sukceso oni povas kore gratuli la Vien'ajn samideanojn.

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, findata kaj kompleta informaro, ni bezonas scilgion (sur postkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administral aŭ privataj scilgion) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, findinde, legeble (precipe nomoj).

Ameriko.

Dominika respubliko.

Sanchez. El sendaĵo el tiu ĉi urbo ni konstatas kun plezuro, ke tie ankoraŭ ĉiam propagandas Esperanton malnova batalanto por nia afero, s-o d-ro B. Macdonaldo muljara delegito de UEA. Esperable la projekto de mez-amerika societo baldaŭ efektiviĝos.

Meksiko.

Tampico. La 21. okt. okazis tre sukceshavinda propagandefso kun parolado de la merita prezidanto s-o Isaias Fajardo. poeziaĵo, monologo, naciaj kantoj, muzikaĵoj ktp. La aktiveco de niaj meksikaj samideanoj estas modela.

Porto Riko.

Ankaŭ sur tiu ĉi insulo la Esperantista vivo revigligas, kiel ni sciigis per abondante de nia gazeto. Entute oni povas konstati pligrandigan intereson pri nia movado en kelkaj izolaj landoj kaj lokoj.

Eŭropo.

Belgiujo.

Liure (Lier). Nova kurso estas aranĝita.

Francujo.

Paris. La parisa grupo anonas 8 publikajn kursojn. Krom il estis kursoj en la parisa ĉirkaŭaĵo: Arcueil, Aulnay-sous-Bois, Bourg-la-Reine, Colombes, Hay-les-Roses, Issy-les-Moulineaux, Kremlin-Bicêtre, Levallois-Perret, Pantin, Rosny-sous-Bois, Saint-Maur-des-Fossés. Korespondanta kurso de la parisa grupo.

Angers. Kurso de la grupo en la urbdomo.

Lyon. Kurso en kvar lecionoj de la Esp. grupo en la grupejo, anoncita en ĉiuj gazetoj.

Beauvais. Kurso en la urbdomo gvidata de ing. Thomas.

Germanujo.

Hamburg. La Loka Unuiĝo de Hamburg-Altona aranĝis tri kursojn por komencantoj. La partoprenantoj estas 36 instruistoj.

S-o Senff el Hamburg parolis publike dum la Nederlanda Esperanto Kongreso en Zutphen.

Köln. La 7. okt. okazis en Köln la ĝenerala ĵarkunveno de Rejnlanda-Vesifalia Esperanto Ligo (REVELO). Ĉeestis reprezentantoj de la grupoj Homberg (3 voĉoj), Horrem (1 voĉo), Köln (4 voĉoj), Köln-Kalk (1), Rheydt (1), Solingen (2), Stolberg kaj izolaj membroj. Entute estis reprezentitaj 7 grupoj kun 20 voĉoj el 26 grupoj kun 40 voĉoj. La nombro de membroj pligrandiĝis de 267 personoj ĝis 925. La kazo rezulzigis malgrandan pluson. Krome oni konstatas, ke tiuj grupoj pleje progresis, kiuj estis en konstantaj rilatoj kun Revelo. La kolizon por la lasta kvaronjaro de 1925 oni fiksis laŭ la kostoj por simpla letero enurba je la pagotago por ĉiu membro de grupo, izolaj membroj pagas la duoblon, izolaj membroj en lokoj kun grupoj la trioblon. — Propono pri peticio al la telegrafia administracio pri akcepto de Esp. kiel „klara“ lingvo estas transdonota al la kompetenta Germana Esperanto

tiu, kiun tiam oni pagis por „Tiziano“; la antaŭlasta posedanto estis negocisto ne kapabla ĝin taksi.

Profundaj esploroj de la nuntempa proprajulo, profesoro honoris causa Otto Migze en Londono, faritaj precipe en la biblioteko de la Brita Muzeo, klare nun difinas la tri personojn en la „Concerto“.

Laŭ ili la ĉefa figuro en la mezo de l' bildo estas la kardinalo Alessandro Farnese, posta papo Paŭlo III-a, 26-jara, ludanta kordpianon; dekstre kun liuto staras kardinalo Giovanni de' Medici, posta papo Leo X-a, en la aĝo de 19 jaroj; la tria, la plej juna, nur 17-jara, estas Giorgione mem.

Vasari rakontas ke Giorgione pro sia vere dia kantado kaj liutludado estis glore konata en plej altaj rondoj. Lia ĉeesto en la bildo tion konfirmas.

Alessandro Farnese fariĝis kardinalo en 1493, la „Concerto“ estas pentrita de Giorgione dum la sekvonta jaro. Dum ĉi tiu jaro 1494 la partianoj de Medici kaŭze de revolucio estis ekzilitaj el FIRENZE. Giovanni, iĝinte kardinalo jam en la aĝo de 14 jaroj (dank' al amikeco de lia patro kun la papo), estis tiam ambasadoro en Bologna kaj rifugiĝis al Venezia. Tiamaniere komprenebligas lia ĉeesto sur la bildo.

Oni ne scias ekzakte, kiam Giorgione finis sian pentraĵon, sed prokrastoj en la laboro estas tre verŝajnaj pro lia daŭra okupado per freskopentraĵoj.

Laŭ aserto de la nuntempa posedanto, la Londona originalo estas pentrita per la kardinalo

Asocio. Post pritrakto de kelkaj punktoj koncernantaj organizajn demandojn kaj la problemon de lenrolbriroj oni reelektris la estraron, reprezentitan per la grupo de Köln. Adreso de la prezidanto estas: A. Junker, del. de UEA, Köln, Hohestr. 26.

Hungarujo.

Győr. Kurso de komencantoj finiĝis kun 10 partoprenintoj. Kurso por progresantoj ekkomenciĝis kaj okazos unufojon dum ĉiu semajno. La fakto, ke la kongreso en venonta jaro okazos en Vien, allogas multajn interesatojn.

Esp. prelegoj en Budapeŝto.

Ĉiuvendrede kaj ĉe Esp. studenta grupo ĉiulunde okazas interesaj Esp. prelegoj aŭ paroladoj. En oktobro estis la temoj: pri vojaĝoj per Esp., pri Esp. kongresoj, pri telepatio kaj hipnotismo, pri sekrelingvoj de ŝtelistoj, pri oficialaj Esp. organizaĵoj ktp. La 2. nov. estis memora tago por mortintaj hungaraj Esperantistoj el kiuj oni ĉefe menciis la faman hungaran lingviston D-ro S. Simonyi, la junan poeton Henriko Geiger kaj la konatan samideanon D-ro Rudolf Rajczy. Parolis pri ili D-ro Takács, D-ro Lóránd kaj P. Balkányi.

Esperanto-faĝoj en Budapeŝto.

La 27. kaj 28. oktobro okazis Esperanto-kunsidoj en Budapeŝto en la Socia Muzeo, aranĝitaj per la Hung. Landa Societo. Jam la 26. vespere estis tie prelegadoj pri la nunaj oficialaj Esp. organizaĵoj. La 27. posttagmeze s-o prel. D-ro Giesswein malfermis la eksterordinaran ĝeneralkunsidon de la societo, kiu daŭris ankoraŭ la sekvantan antaŭtagmezon. La kunsido decidis eldoni oficialan organon „Hungara Esperantisto“ venontjare en propra eldono en Budapeŝto. Ĝi fiksis la kolizon minimumum je 2 kronoj oraj. Oni kompletigis la liston de komitatoj kaj akceptis kelkajn modifojn en la regularo. Oni krome decidis la starigon de kelkmembra agema laborantaro aparta, nomata „ataklgrupo“, kies membroj discipline devas labori en la kadro de la societo. Ĉefaj parolantoj estis D-ro Giesswein, D-ro Lóránd, D-ro Mezei, D-ro Takács, P. Balkányi, J. Baghy, K. de Kalocsay, D-ro Tóth, St. Nagy Molnár, E. Tolnai kaj aliaj. Samtempe okazis kelkaj propagandparoladoj. La plej sukcesa estis en la ŝtata blindulinsitudo, kie 300 personoj ĉeestis kaj la direktoro mem parolis. Interese estis surda-blinda junulino, kiu per Esperanto lernis la anglan lingvon. En kracista societo parolis D-roj Lóránd kaj Mezei, en viritrajnista societo J. Máteffy. Posttagmeze ĉe sukcesa literatura festo deklamis Kalocsay, Baghy, Balkányi, kantis kaj dancis f. ino Noiret kaj aktoro Sárossy, laŭlegis D-ro Tóth. La feston oni ripetos en decembro je memoro de D-ro Zamenhof.

Nederlando.

Veendam. La Societo pri la Akcelo de la Publika malfermis kurson kun 14 partoprenantoj sub la gvidado de P. van Dokkum, estro de la Veendam Lerneja Unuiĝo.

Rusujo.

Ĉerepovec (Ruslando). Loka ĵurnalo kooperata „Krasnij fakel“ volonte enpresas priesperantajn artikolojn verkatajn de s-o A. P. Drozdov. Jam aperis du artikoloj donintaj sukcesan rezulton. Eksterlandaj gesamideanoj estas petataj sendadi Esperante skribitajn artikolojn por tiu ĉi ĵurnalo al s-o A. P. Drozdov, str. Pokrovskaja 16, Ĉerepovec (Rusujo), kiu tradukos ilin rusen por enpresado. Al sendantoj estas sendata ĵurnala nomita „Ekzistas loko Esperanto grupo. kunvenanta laŭvole en la Palaco de Laboro kaj restoracio unuaranga“. Esp. kurso gvidata de s-o A. P. Drozdov ekzistas ĉe milita kormisariejo; kursano P. Janičev dum unu monato studis la lingvon tiom, ke li bone tradukas kaj skribas.

Estas bezonataj Esperantoj por legado, pri kiuj helpi laŭpove oni petas eksterlandajn samideanojn.

Socia vivo. Socialaj studoj.

De R. Ĉivinski, Petrograd.

Efektiva kaŭzo de militoj.

(Fino).

IV.

Tamen mi devas averti la legantojn: la supre montrita de mi ekzemplo ne plene klarigas ĉion necesan en la demando pri kaŭzo de militoj. Mi mem tuj montris, kiel oni povas kaj devas parolrebatl ĝin.

Vere, ke eble nur firenuzuloj povas ekdeziri aranĝi militon inter loĝantaro de Kaluga kaj Tule gubernioj, tamen ia ne ĉie la stalo de la afero estas tuta sama. Nome, en sama Rusa regno en

Alessandro Farnese; tiu de FIRENZE, kopio sendube por Giovanni de' Medici el FIRENZE.

La du kardinaloj — ne monaĥoj, kiel oni erare supozis ĝis nun, ne vidinte la peltgarnajon de l' Farnese — estas rekonseblaj kiel la supre cititaj personoj en diversaj pentraĵoj de Raffaello kaj el bildoj de papoj. Je la unua fojo oni sciigis ĉi tie, kiel Giorgione aspektis. La opiniita memportreto en Braunschweig (en kiraso!) tute ne koncernas Giorgione.

Per ĉi tiu en Londono trovita originala figuro de junio en la „Concerto“ oni povas identigi Giorgione kun lia figuro en aliaj portretoj, ekz. kun tiu en Budapeŝto, pentrita de Raffaello, prezentanta belan junan viron kun virinecaj trajtoj, kiel ankaŭ en pentraĵo en FIRENZE, farita de Giorgione mem, prezentanta amsecon, kaj same bildo de Tiziano en la pinakoteko de München, montranta junulon barbhavan.

Dum la mezo de la 17-a jarcento, je la epoko di Ridolfi, oni ne plu konis la indentecon de la personoj en la du pentraĵoj. Tute erare oni opiniis ke la figuro dekstra, pro la simileco, estas Luther; Alessandro Farnese oni kredis esti Bucer, kaj la figuron kun virinecaj trajtoj oni opiniis identa kun Katarino de Bora.

Ĉi tiu legendo konserviĝis ĝis hodiaŭ, kvankam tiam, en la jaro 1494, Luther estis nur 11-jara kaj Katarino de Bora ankoraŭ ne vivis.

Dum la 17-a jarcento la kopio de FIRENZE estis fuŝe surpentrita. La originalaj trajtoj malaperis, vulgaretoj anstataŭis noblan spiritplenan arton. Al junulo oni surmetis pompan plumĉapelon kaj

aliaj lokoj kaj gubernioj, kaj en alia tempo ol nun, armita loĝantaro de kelkaj gubernioj militiris kontraŭ armita loĝantaro de siaj najbaraj gubernioj. Tiel ĝuste estis ekzemple en Rusa regno en 1851 kaj en 1864, kiam armita pola loĝantaro de la okcidentaj gubernioj de Ruslando militis kun armita loĝantaro de la pli orientaj gubernioj de la sama regno; kaj, certe, ne ĉiuj el ili verŝajne estis tiam sole frenezuloj? Oni devas sekve ekstudii kaj preparoli por plena kompreno de la problemoj pri kaŭzo de militoj, la staton de la aferoj, ekzistantan en du okazoj: 1. gubernioj, similaj al Kaluga kaj Tula, 2. gubernioj similaj al Varsovia aŭ Vilna unuflanke kaj — al Moskva aŭ Novgorod duaflanke.

Se vi, estimata leganto, bone pristudos la diferencojn en la lasta montrata de mi ekzemplo, tiam vi venos al nepra kaj certa konkludo, ke plej ĉefa karakteriza kaj konstanta elemento de la diferenco inter ili estas nenio alia ol — lingvo!

Sekve do lingva faktoro, jen estas objekto, kiun oni devas starigi je dua punkto, kaj tuj post la punkto pri la tutmonda organizado, por tute ĝuste kaj vere racie decidi la problemojn pri kaŭzo de militoj kaj pri forpelo de tiuj lastaj el homara vivo.

Tamen aperas demando, en kia formo do oni devas ĉi tie starigi lingvan faktoron por bone helpi al decido de la montrata problemoj. Nu, kompreneble, ni Esperantistoj ĉiuj bone scias tiun ĉi formon de la decido, kiun mallongigite oni povas esprimi tiel: krom naciaj lingvoj por intertaliaj interne-naciaj oni devas posedii ankoraŭ helpan lingvon internacian por intertaliaj inter-aŭ ekster-naciaj. Ni Esperantistoj certe posedas sufiĉe multe da logikaj praviloj por aserti, ke por la rolo de internacia lingvo estas plej bona ilo — la Zamenhofa arta lingvo Esperanto.

Kompreneble, la internacia lingvo Esperanto ne nur povas helpi moligi reciprokajn nacian diferencojn, malvarmecon kaj nekomprenleblecon; tamen ĝi aparte kaj trege ne povas esti teknike utila por kaj dum preparolo, aranĝo kaj agado de la supremontaritaj organizadoj: 1. tutmonda interregna tribunalo; 2. tutmonda politika konstitucio kaj jurorganizajo kaj 3. tutmonda militistaro en la servo ĉe tutmonda tribunalo. —

V.

Nun fine ni turnu nin al provoj de filozofia klarigo de la demando pri kaŭzo de militoj.

Aperas tie ĉi certe iom filozofia, tamen tute simpla kaj natura demando: kial do ĝis nun neniu el tiuj ĉi tri supremontaritaj tiom grandaj kaj tiom famaj doktrinaj ekscipovis iam starigi antaŭ sia filozofia penso similan tute simplan ekzemplon, kiun mi prezentis ĉi tie nuntempe al la atento de la estimataj gelegantoj de „ET“? Ĉu nur tute okaze en mian kapon venis la penso pri tiu ĉi ekzemplo kun la du gubernioj?

Oni devas respondi je tio, ke certe ne okaze. Tiu ĉi koncepto, marksismo, anarĥismo kaj pacifismo unuflanke, kaj la mia — duaflanke, estas konceptoj de diversaj homaraj epokoj.

Marksisma, anarĥisma kaj pacifisma vidpunktoj, malgraŭ siaj kelkaj apartaj, ofte eĉ tre grandaj diferencoj, apartenas tamen ĉiuj al unu komuna mondkoncepto de la tuta malnova historia epoko de homaro, kiu, miaopinie, forpasis jam ĝis nun, kaj kiun mi nomas: „epoko de principo de absoluteco“. Mia do, filozofie-sociologia vidpunkto apartenas jam al nova epoko, kies ĝustan komencon, miaopinie, oni povas kaj devas kunligi tute difinite kun tempo de la apero de la matematike-fizika teorio de

relativeco de Alberto Einstein. Tiu ĉi novan, estontan historian epokon de homaro mi nomas: „epoko de principo de relativeco.“

Efektive, ni vidas, ke la supremontaritaj tri doktrinaj, marksismo, anarĥismo kaj pacifismo, ĉiuj tute egale karakterizigas per tio, ke ili ĉiuj estas naskitaj per manierpensado absoluteca: ili ĉiuj estis fanatike absolutece forigitaj per sia penso al unu sola flanko de homara vivo: ili tute ne deziris ekrigardi kaj ekpripensi aliajn ĝiajn flankojn, [kaj ne povis samtempe kompreni, ke reala vero povas esti nur relativeca, kaj tiel estas ke ĉiu el iliaj asertoj povas okazi relativece vera, dum apartaj kondiĉoj de spaco kaj tempo, kaj tiel estas. Sed tiun sian relativecan veron ili opiniis kaj proklamis kiel veron absolutecan, taŭgan kaj justan por absolute ĉiuj spacoj kaj tempoj.

Sed ni nin turnu de tiu ĉi absoluteca kredo de la malnova epoko al provoj de manierpensado relativeca, kaj de tiu ĉi lasta vidpunkto ni estu serĉantaj filozofiajn klarigojn al fakto de ekzistado de nacie-regnaj militoj.

Tiuj ĉi nacie-regnaj militoj okazas pro nacie-regnaj konfliktoj. La lastenomitaj konfliktoj povas certe okazi pro tre diversaj motivoj, kaj ili povas en diversaj apartaj okazoj iufoje esti eble pli proksimaj al klarigoj de marksistoj (kulpo de la klaso), aŭ al anarĥistoj (kulpo de la potenco), aŭ al pacifistoj (kulpo de militaj homoj). Sed mi demandas: ĉu ĉiam kaj ĉie sur tero ĉiuj homaj konfliktoj ricevas sian finan decidon kaj juĝon nur per „glavo“? Certe ne: tio tute ne estas nepra kaj konstanta leĝo de homara naturo; ni ĉiuj ja tion scias tute bone. Kiel do okazas alie? Alie okazas tiel, ke du disputantaj flankoj venintaj al iu konflikto invitas al si, ĉu propravole, ĉu ekster sia volo, iun trian tute fremdan flankon, kies decido, ĉu bonan, ĉu ne bonan, sed „praktike oportunan“, ambaŭ tiuj ĉi disputantaj flankoj estas devigitaj vole-nevole akcepti, tute neniam, eĉ unufoje, uzante en tiu tuta agado la servon de „glavo“.

Jen do estas la decido de homaj konfliktoj per relativeca vero!

En reala socia vivo nuna, t. e. ekzemple decidoj de t. n. „arbitra trieca juĝo“ inter du, tri aŭ pli apartaj personoj, aŭ inter du, tri aŭ pli diversaj socialaj apartaj grupoj en konflikto, tiuj relativecaj juĝoj jam ekzistas aŭ per iuj apartaj homoj, aŭ institucioj, ekz. polico, jura, gubernia kaj regna potenco, ktp. Kaj nur por inter-regnaj konfliktoj tiuj relativecaj juĝoj kun necesaj juraj atributoj bedaŭrinde tute forestas. Pro tio ĉi el nunaj apartaj regnoj venis al multcentjara kutimo pensi, ke ĝia aparta nacie-regna vero (efektive-relativeca) estas sole ĝusta kaj justa vero absoluteca, kaj ne vidante racian eliron el tiu ĉi sorĉa absoluteca rondo, ĝi certe nature sin turnas al decido de disputo per perforta „glavo, sangon soifanta“, jen sekve en kio eneniĝas filozofia flanko de la demando pri kaŭzo de militoj: la ekzisto de fakto de decidoj de interregnaj konfliktoj per vero imaga, t. e. absoluteca, anstataŭ vero reala, t. e. relativeca.

Internacia sporto.

Piedpilko.

La rusaj piedpilkistoj en Eŭropo.

Videble la ideo pri bojkotado de la „mal-amikaj“ sportistoj fiaskas en la sport-mondo, supezeble estonte neniu sportista organizajo plu

En lia 33-a vivjaro la pesto rapide forprenis Giorgione, de kiu samtempaj artistoj atendis eĉ pli altvalorajn verkojn ol de Tiziano, lia tiama lernanto kaj amiko.

Ornamante per freskaj pentraĵoj siajn proprajn domojn kaj palacojn en Venezia, li estis elĉerpinta la plei grandan parton de sia tempo kaj forto; malgranda do nur povis esti la nombro de liaj ceteraj pentraĵoj.

Inter la konservitaj verkoj de ĉi tiu june morinta sed tamen fama majstro, videblaj precipe en naciaj penirajo-galerioj, la „Concerto“ estis ŝatata kiel lia ĉeflaboro.

Laŭ la supre faritaj detalpriskriboj la Londona bildo estus do la sola de Giorgione kreita verko ne superpernitita.

Ci tiu grandega avantaĝo samtempe kun la dokumente pruvitaj konstatoj de la nuna posedanto kaj la fakto, ke pentraĵoj de Giorgione ne plu estas acetebelaj, ke la bildo en Firenze ne plu povas esti konsiderata kiel originala laboro de li, ĉio tio aldonas al la Londona eltrovo netakseblan valoron, kaj la tuta artama mondo vere povas ĝoji pri la ekzisto de ĉi tiu artrezoro, pri ĉi tiu vera unika kaj unika „Concerto de la musika“.

Tradukis Henriko Friedöri, L. K.

Al hodiaŭa numero estas aldonita la novembro „Internacia Komerc“.

aplikos ĝin. Post la sport-tagoj de Göteborg okazintaj kun partopreno de germanaj sportistoj, nun en la internacian konkurssferon eniris ankaŭ la rusaj.

Pri la sukcesplena rondvojaĝo de la rusa trupo ĝis nun ne estis raportite en ET, do la subskribinto prenas la taskon forigi tiun mankon.

La ideo inviti la rusajn piedpilkistojn Skandinavian apartenas al gazeto „Politiken“, kiu estas la organizinto de ĉiuj okazintaj ludoj en Svedujo kaj Norvegio. Ĉiuj ĉi ludoj rezultigos venkon de la kunmetita rusa trupo (petrogradanoj kaj moskvanoj) kaj nome:

- En Svedujo
- 5. VIII. kontraŭ kunmetita Stockholm'a trupo 5 : 5
 - 4. „ „ „ Göteborga trupo 4 : 3 (0 : 5)
 - 6. „ „ „ Kamraterna (Lldevala) 5 : 0
 - 7. „ „ „ Halmstad'a trupo 5 : 2
 - 8. „ „ „ Smaland'a kunmetita trupo 5 : 3
 - 10. „ „ „ Kamraterna (Norrköping) 2 : 1
 - 11. „ „ „ kunmetita trupo Örebro 5 : 0
 - 14. „ „ „ Västerås'a trupo 2 : 0
 - 16. „ „ „ trupo de Gälle 2 : 2
 - 21. „ refoje kontraŭ Stockholm'anoj laŭ ilia invento 2 : 1

- En Norvegio
- 24. VIII. kontraŭ Kristiania 4 : 1
 - 26. „ „ „ klubo de Hammar 8 : 0
 - 28. „ „ „ tiu de Trondheim 5 : 0
 - 30. „ „ „ kunmetita norvega trupo en Kristiania 5 : 2

Do, el 14 ludoj la rusa trupo gajnis 11 (3 ludoj restis senrezultaj); alivorte ĝi gajnis 55 kaj malgajnis 20. El Skandinavio la rusa trupo veuris Germanion, kie (en Berlin) la 9. IX. okazis la unua ludo (6 : 0). Krome okazis ankoraŭ 2 ludoj (en Berlin kaj Stettin) kies detaloj mankas al ni.

La 19-an, traveturante Estonion survoje al Rusujo, la hejmenrevenantaj piedpilkistoj ludis en Reval (Tallinn) kontraŭ kunmetita estona trupo („Kalev“-„Sport“-„T. J. K.“). La ludon ĉeestis amaso da rigardantoj, interalie la rusaj ambasadoro kaj konsulo. Estas notinde, ke malgraŭ evidenta venko de la rusoj (4 : 2) la loka gazetaro aperigis sekvintan tagon post la priluda raporto grandan artikolon, krediganta la publikan opinion pri mala rezulto de la ludo kaj plena malvenko de la rusa trupo.

Konsiderante la altan nivelon de la skandinaviaj piedpilkistoj kaj precipe la malvenkon de la Stockholmaj kaj norvegaj kunmetitaj trupoj, oni ne povas nei, ke la cititaj rezultoj estas brilaj.

La sama trupo en majo vizitis Finlandon por 7 ludoj kaj estis venkinta tie 7 : 5.

Estas bedaŭrinde, ke ne okazis renkontoj kun la plej bonaj Berlinaj ĉampion-trupoj kaj kun hungaroj. Eble tio okazos baldaŭ!

R. Lorentson, Tallinn.

Parolejo.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiaj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio lamen en prenas sur sin iun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netaĝajn artikolojn.

239.

Celante pliriĉigon de nia lingvo, mi decidis proponi al la Esperantistaro jenajn tri demandojn:

1. Pola samideano diris, interalie, ke la vorto „nastro“ (rusa „nastro-jénie“, germana „Stimmung“) ne estas tradukebla Esperante; ĉu tio estas vera? Mi antaŭ eldiri mian opinion, tre petas, ke rusaj, polaj kaj germanaj samideanoj eldiru la siajn.

2. Por traduki la rusan „derjava“ oni uzas ordinare „potenco“; ekz. „ses grandaj potencoj de Eŭropo“, — sed „potenco“ signifas ruse „vlasti“ (la turajo de leĝaj aŭ moralaj povoj de iu persono kaj, precipe, registaro, kaj la registaro mem). Sed „derjava“ estas precize tradukebla per „regno“: „Ses magnaj regnoj de Eŭropo“.

3. La vorton „magna“ mi opinias internacia kaj necesega por traduki la rusan „veliki“, kiu signifas „havanta grandegan influon, aŭtoritaton; ire granda mense, morale“, dum la vorto „granda“ signifas „egedimensia, egespaca, alta, dika kaj larĝa“. Do, ni prave uzas „granda“ kaj „magna“ paralele, kiel ni uzas „ŝanceliĝi“ kaj „hezli“.

Kiel finargumenton mi skribas la frazon: „La malgranda bildo estas (granda) magna artajo.“ Petro la Magna estis homo granda (korpulenta).

Diverslandanoj eldiru sian opinion!

N. S. Pargačevskij, St. Verino, Ussur, Jeldor, Siberio.

Rim. de la redakcio: „Magna“ estus superflua balasto. „Granda“ kaj „grandega“ enhavas la saman sencen. Cetere s-o Pargačevskij eraras pri la internacieco. Ĝi ekzistas sole rilate al ĉiuj, kiuj lernas. . . . latinan lingvon. La novlatino Esperanto por tio havas la vorton granda (resp. grandega). Ĉu ne sufiĉas kaj ankoraŭ pli trafte karakterizas: Petro la Eminentia (granda laŭ spirito) estis granda (laŭ korpa mezuro)?

240. Rilatas al 230.

La mallongigo de vortoj estas pli multe afero de kutimo (aŭ de konvencio) ol de logiko. Do oni povus mallongigi laŭplaĉe s-o (S-o, so., So., s-o, S-o) aŭ s-ro (S-ro, sr-o, Sr-o, s-ro, Sr-o, s-ro, Sr-o, s-ro, Sr-o, sr., Sr. ktp.). Sed la esenca celo de mallongigo estas sparo de tempo kaj spaco. Do mallongigo plenumas sian celon des pli perfekte, iu pli mallonga ĝi estas. Kompreneble ĝi ne devas prezenti eblecon de erarkompreno, resp. eventuala ebleco de erarkompreno devas esti konvencie forigita.

Pro tio mi preferas por ET la mallongigon s-o por „sinjoro“, tiom pli, ĉar ĝi estas konformaj al la mallongigo s-ino por „sinjorino“, dum la konforma mallongigo por s-ro estus s-rino. Erarkompreno kun „samideanoj“ estas forigita, ĉar por ĉi tiu vorto ni havas la mallongigon s-ano, s-anino (kelkaj skribas s-do, s-dino aŭ simile).

Ankaŭ la dispartigo de vortoj laŭ gramatikaj aŭ parolaj silaboj estas laŭvola. Tamen mi opinias, ke la aplikado de unu egala metodo estas preferinda al la aplikado de du diferencaj metodoj.

Mi konsentas al la vortoj de s-o Minor, ke interne de radiko ne ekzistas gramatikaj sed nur parolaj silaboj, kaj

ke ne estas bele meti simplan literon aŭ du literojn al la komenco de linio. Sed mi ne konsentas konsideri finaĵojn kiel parton de radikoj resp. de sufikso; radikoj (resp. sufikso) kaj finaĵoj fakte estas du diversaj partoj de vorto. Cetere, se oni dispartigas „sinjo-ro“, tamen nur du literoj estas metataj al la komenco de linio.

Ekzistas kompositista regulo, ke oni ne devas transpreni unu aŭ du literojn de vorto en sekvantajn liniojn, unu por malbela aspekto, kaj due pro la konsidero, ke la dispartiga signo jam okupas la spacon de unu litero kaj povas esti anstataŭata per ĝi. Do, en tiu ĉi komposito, la ĉiujn taŭga komposito neniam (escepte ĉe tro mallarĝaj kolumnoj) dispartigas „sinjo-ro“ aŭ „sinjo-ro“, sed aŭ „sin-joro“ aŭ tute ne.

Alia estas la afero ĉe skribaĵoj, ĉe kiuj ne estas grave, kiomaniere oni dispartigas la vortojn. Sed ĝenerale ankaŭ tie oni evitas transpreni unu aŭ du literojn de vorto en la sekvantajn liniojn.

Rilatiĝante min denove al la mallongigoj, mi ne pretendas, ke ĉiuj mallongigoj aplikataj en ET estas la plej fatigaj. Mi persone preferus, ekz., d-ro al Dr., d-o aŭ d-to al del., s-no al s-ano ktp. Persone mi pli ŝatus skribi „Esperantisto“, „Esperanta“ per malgranda komencilitero, mallongigo „Esperantisto“ per esp-isto anstataŭ per Esp. — Sed mi agis en tiu pli multe laŭ la kutimo ol laŭ mia konvinko.

Tamen estus dezirinde, ke la Akademio starigu sisteman liston de mallongigoj kaj rekomendu ĝin al la ĝenerala uzado, por ke almenaŭ la plimulto de la Esperantistoj kaj Esp. gazetoj apliku la samajn mallongigojn.

Teo Jung.

Bibliografio.

Libroj.

El problema de l'Idioma Internacional. Parolado farita la 1. febr. 1923 en la pedagogia muzeo de Montevideo de M. Fernández Menéndez, Montevideo (Urugvajo). 64-pg. en hispana lingvo. 12x19 cm, broŝ. Prezo ne indikiĝas.

La broŝuro pravas ankaŭ la evoluon de nia movado en la Sudamerika kontinento. Tre aktiva pioniro de nia movado en Urugvajo instruis la publikon per detala parolado pri Esperanto. Al la demandoj: Kio estas Esperanto, kiu celon ĝi havas, kiel progresojn ĝi faris ktp., ĉi tiu parolado respondas per tre detalaj respondoj. Kompilata kune kun taŭga antaŭparolo, pluraj bildoj el la malnova kaj nova historio de Esperanto — Zamenhof, Kongreso de Barcelona, Esp. gazetaro, Laborista Grupo en Barcelona, Unua Esperanto-Ekspozicio en Montevideo, Kongreso de Helsinko, Konferenco de Genève — la broŝuro estas alloga propagandilo.

Hispanlingvaj gesamideanoj tre utile povos uzi la broŝuron. Espererike ĝi estas amase sendata en latinan Sudkaj Mezamerikon por tie gajni novajn samideanojn en tiuj landoj, kie nia movado estas ankoraŭ tre malforta. R.Kr.

Esperanto for Young Beginners. 7-a eldono, broŝur. 24 paĝoj, 10x16 cm. Eldonita de Brita Esperanto Asocio, 17 Hert Street, London WC 1. Prezo 2 pencej.

Tiu ĉi gvidilo estas resuma lernolibro kaj enkondukas la interesaton pri Esperanto en la esencan konstruadon de nia helplingvo. Ĝi ne povas anstataŭi bonan lernolibron, sed sufiĉas plene por la komenco. La ekzemploj estas tre bonaj. Modele mallongaj frazoj ekzemple tre bone instruas al la lernanto la diferencon inter la angla kaj Esperanta sintakso. Malgranda vortlisto ebligas tradukon de facilaj tekstoj. Kion postuli ankoraŭ? La malaltiga prezo ebligas amasan propagadon.

Pro tio la broŝuro ankaŭ tre taŭgas por forsendo al ekstereŭropaj landoj, kie la angla lingvo estas parolata kaj ne jam troviĝas multaj Esperantistoj.

Oni devas gratuli niajn anglajn samideanojn pro tiu ĉi eldonitaĵo. R. Kr.

Gazetoj.

Literaturo, London WC 1, julio-sept. Espero Teozofia, Praha II, sept.-okt. Tipografie tre bele aranĝita.

Literatura Mondo, Budapeŝt VI, okt. Estas superflue mencii la konstante bonegan aranĝon.

Litova Stelo, Kaunas, okt. Dua numero de tiu reaperanta gazeto. Ni trovis en ĝi sufiĉe multajn francismojn kaj kelkfoje nemodelan Esperanton. Cetere ni ne scias, ĉu estis necese aperigi duan gazeton, dum kiam la organo de la landa organizo batalas kontraŭ malfacilaĵoj.

Ligilo, Stockholm, nov.

Esperanto, Genève, nov. Kun aldono „Bulteno“ de la Internacia Labor-Oficejo.

Sennaciera Revuo, Paris XI, nov. Kvankam la lingva tendenco ne ĉiam plaĉas al ni, ni devas gratuli niajn samideanojn-laboristojn pro tiu ĉi bonaranĝita organo. La nova aldono literatura-scienca igas ĝin ankoraŭ pli valora.

Norvega Esperantisto, Kristiania, aŭg.-sept.

La Interligilo de P. T. T., Paris XVII, nov. Leginda fak-organon el la poŝta sfero.

Novaj Tempoj, Leipzig-Connewitz, nov. Revuo de popul-edukado.

Internacia Stenografisto, Issy-Seine, dec. Fariĝas pli kaj pli faka. Pli bona aŭtografio estus dezirinda.

Al la tutmonda Esperantistaro!

La Esperantistoj en Sirio, kiuj jam unufoje kun plena sukceso vokis la helpon de la tutmonda Esp-aro, kiam ili petis gastigi malsatintajn infanojn, tre turnas sin al vi pro helpe. Sed ĉi-foje ili ne petas por si mem. Hodiaŭ ili petas vin, helpi al aro da plej fervoraj gesamideanoj, kies hejmlando estis la lulilo de la Esperanto-movado, kiuj unuaj atingis la kreon de ŝtata Esp. instituto, kiuj malgraŭ la plej malfavoraj cirkonstancoj aranĝis la ĝis nun plej multnombrian kongreson, kie vi bonfartis, inter kiuj nuntempe estas kelkaj el niaj plej talentaj kaj plej diligentaj verkistoj kaj vortaristoj ktp. Mallonge, helpu al niaj gesamideanoj en Germanio! Ni havas la konvinkon, ke ni ne vane petas, ĉar Esp-ist(in)o helpas al samideanoj, se estas necese kaj tel eble. — Pro tio ni proponas, ke la Esp-istaj societoj, kluboj ktp. estu la propagandistoj kaj kolektistoj por la donacoj kaj ke ili sendu la donacon al tiu grupo en Germanio, kiun ili elektos. Kie ne estas grupo, tie la delegito de UEA estu la apostolo de samideana homamo. Oni instigu ankaŭ ne-Esperantistojn al kunhelpo, ĉar ni ne helpas politikulojn, sed malsatigintajn homojn, kiuj havas antaŭ si senkonsolan vintron. Imagu proprajn viajn infanojn, parencojn kaj gepatrojn malsatantaj kaj frostigintaj! — Esperantistoj, rez montru al la mondo eterne batalanta, kio estas Esperantismo!

D-ro Adolf Halbedl,

Del. UEA kaj prez. de la loka Esp. grupo Graz.

Ĉiuj Esp. gazetoj estas korege petataj, represi ĉi tiun alvokon!

Koncertpianistino Irene Mochnacki

instruas — nur konscience — plene laŭ la metodo Leschetizky

en sia loĝejo aŭ ĉe la lernanto. Malbonaj kutimoj de la mantenado estas precipe zorgo korektataj. Pagu al la instruistino po Kr. 30.000.— por unu horo.

Wien, III., Fasngasse 32-II-11, Aŭstr.

Arta Kristnaska Donaco! Esperantaj! Malmultkosta!

Hungara vilaĝo brodas por fablomezo kun verda stelo inter floroj! Delikata propagando ne altruda! Ornamo de ĉi ĉambroj! Prezo sv. fk. 10.— aŭ egalvaloro. Mendebila per

P. Balkányi, Budapest, VI., Hajos-u. 15, Hungari.

Korespondantoj serĉataj!

Ni deziras korespondi kun inteligentaj personoj, kiel profesoroj de laborjuro, laboristoj, juĝistoj, ĵurnalistoj, oficistoj k. a. el la tuta mondo pri socialaj problemoj, precipe pri protekto, asekuro, ado kaj higieno de laboristoj.

Redakcio de „RADNIČKA ZAŠTITA“

oficiala gazeto de la Centra Oficejo por la asekurado de laboristoj. Preradovičeva ul. 44, Zagreb (Jugoslavio).

INTERŜANĜO DE POŝTMARKOJ.

Kvanto kontraŭ kvanto

Kvalito kontraŭ kvalito

Filatelista afranko! —

Ne sendas unue. Sendu referencojn aŭ deponu ekvivalenton.

Albrecht, Köln (Germ.)

Zuckerberg 8.

Esperantista Centra Librejo

51, rue de Clichy, Paris.

Eldonejo de la Verkoj de D-ro L.L. Zamenhof kiujn ĉiu Esperantisto devas legi.

Ĉefaj verkoj aĉeteblaj:

Fundamenta Krestomatio, entenanta la „Ekzercaro“ (el la „Fundamento de Esperanto“), „Fabloj kaj Rakontoj“, „Artikoloj pri Esperanto“, „Poezioj“.

Unu dika libro 460-paĝa . . . Franc. Frankoj 8.—

Georgo Dandin, komedio en tri aktoj de Molière. Unu libro grandformata 3.—

Hamleto, tragedio en kvin aktoj de Shakespeare. Unu libro mezformata 3.—

Ifigenio en Taŭrido, dramo en kvin aktoj de Goethe. Unu libro grandformata 6.—

Proverbaro Esperanta, laŭ la verko „Frazologio rusa-pola-franca-germana“ de M. F. Zamenhof (1252 proverboj). Unu libro grandformata 3.—

La Rabisoj, dramo en kvin aktoj de Schiller. Unu libro grandformata 4.—

La Revizoro, komedio en kvin aktoj de N. V. Gogol. Unu libro grandformata 4.—

Fabeloj de Andersen. Plena kolekto. Unua libro grandformata 6.—

La Rabeno de Bahara, romano de H. Meine. La Gimnaziano, monologo de Ŝalom Alaĥem. Unu libro grandformata 5.—

Verkoj baldaŭ aperontaj aŭ reaperontaj:

Marta, rakontoj de Eliza Orzeszko. Unu libro grandformata —

Lingvaj Respondoj aperintaj en „La Revuo“. Unu libro grandformata —

Oni aldona al la prezoj, plej por la sendkostoj: 15% + 0,25 fk. en Francujo; 20% + 0,75 fk. en aliaj landoj.

Katalogo senpage sendata.

ĈU VI DEZIRAS LEGI ?

la en ET jam aperintajn literaturajn

Mendu tuon „Bukedo“

1-a volumo. Prezo po 1.— sv. fk.

Por abonantoj 3 ET-numeroj.

Eldonejo Esperanto Triumfonta, Horrem b. Köln.

Gravuraĵojn

ĉiuspecajn en ŝtalo kaj aliaj metaloj,

Kaŭĉukajn stampilojn por societoj

kaj komercistoj,

Sigelmalkojn kaj Insignojn liveras

Jos. Kocourek, gravuristo, Arthaberplatz 5-14, Wien X.

Postulu specimenon kontraŭ 2 resp. kup. Laboristaj grupoj skribu pro nun eldonita karto ilustr.

Anoncetoj.

MORTO. La 27. X. 1923 mortis en Varsovio (Polio) s-ino Eva Brukerz, patrino de s-o Herman Brukarz, del. de UEA en Międzyrzec (Pol.). [1]

FILATELISTOJ. Kontraŭ mondepono mi vendas nun unuaklasajn pm. de ĉiuj landoj. Malnovgermanujo, Eŭropo, Transmaro, kolonioj, malofrajtoj, novaĵoj ktp. je senkonkurencaj prezoj laŭ katalogo de Yvert Teller. Filatelistoj E. Gabelmann, Katharinenstr. 14, Freiburg i. Br., Germ. [2]

BULGARAJ POŝTMARKOJ. Boris P. Kavalgiev, s-Rijahov-Rusensko, Bulgarujo, vendas ĉiujn bulgarajn pm. en kompletaj serioj aŭ laŭ mankolistoj: la pm. estas aŭtentikaj kaj perfektaj ekz., prezoj favoraj, prezoj senpage. Korespondas Esperante, france, angle, germane kaj ruse. Filatelistoj, kiuj represos ĉi tiun anoncon en sia landa filatelista gazeto, estas rekomencataj per bulg. serioj. [2]

BONVALUTLANDANOJ. Mi vendas serion (ĉ. 200) de flagetoj (7x5 cm) sur silko, de ĉiuj landoj, kolonioj, provincoj kaj ĉefaj urboj. Lewandowski, Lwów, Polujo, Rahozy 5. [2]

JUNA KOMERCISTO, 24-jara, serĉas oficon en la ferbranĉo en Ruslando, Rumanujo, Bulgarujo, Holando, Polujo, Turkujo aŭ en Svedujo. Parolas germane, ĉeĥe kaj Esperante. Propozon al s-o Alfons Röttschke, Trautenau, Kirchenslaube 21, Ĉeĥoslov. [1]

ADRESSANĜO. S-o Samuelo Samuel sciligas siajn korespondantojn, ke lia adreso jene ŝanĝiĝis: Ĉiuj, Rumanujo, str. Universitatii No. 5. Mi serĉas seriozajn gekorespondantojn. [1]

SAMIDEANOJ kaj LITERATUR-ELDONISTOJ! Por ke oni vidu la simplecon de Esperanto kaj ĝian helpon, s-o Spas Dobrev, Remanlar, Bulgarujo, aranĝas grandan kristanaskan ekspozicion. Sendu senpage Esperantajn gazetojn, papermonon ktp. [1]

INTERŜANĜANTOJ ATENTU! Laŭ ĉiu foto mi fabrikas belege koloritajn Esperanto-glumarkojn, montrantajn vian portreton, nomon kaj adreson. Uzebal por fermi leterojn, beligi leterpaperon aŭ por interŝanĝo. La foto estas nedifektite resendata. Prezo: por 12 ekz. 1.20 sv. fk., 36 ekz. 2.50 sv. fk. aŭ egalvaloro. Franz Christoph, Wien V, Getreidemarkt 15. [2]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Filatelistoj. Mi dezirus interŝanĝi pm. kun svedoj, norvegoj, danoj, angloj, nederlandanoj, francoj, ĉeĥoslovakoj, hispanoj, portugaloj kaj italoj. Kontraŭ kvanto da nedifektitaj pm. mi sendas saman kvanton da filandaj pm. Adreso: s-o Emil Malinen, Suovärvi a.s., Suvilahi, Finlando. [2]

S-o Bazilo Averin, Astraĥan, poŝtkesto 14, Rusujo, deziras interŝanĝi pm., papermonojn (germ. nur depost 1923) kaj il. kartojn. Kontraŭ bela, plej nova modŝtalo (vira aŭ virina) sendita rekomendite, mi sendas 20—30 diversajn sov. pm. Mi petas sendi rekomendite kaj forie pakite. Mi ĉiam respondas. [2]

Fraŭlo E. Seghers, Deurnestraat 37, Oude-God, Antwerpen, Belgujo, deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun ekstereŭropaj geoficistoj. [2]

S-o Asen Grigorov, Sofia, bulv. Eol-Georgiev 96, Bulg., deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri astronomio, vegetarismo kaj similaj temoj. [2]

S-o Viktor Ruuse en Tallinn, S. Pärnu m. 16-2, Estonio, deziras interŝanĝi monon kaj pk. il. (bfl.) kun la tuta mondo. [2]

Sergei Stessel, Simeonstr. 21-1, Reval, Estnio, korespondas, interŝanĝas per pk. il. kaj l. kaj pm. Respondas ĉiam. [2]

K-do N. Nodenov, Moskva, B. Lisjenskij per d. N. 12, kv. N. 5, Rusujo, deziras korespondi kun gelaboristoj de poŝto, telegrafo, telefono kaj radio pri poŝtaj kaj profesiaj aferoj kaj ankaŭ pri vivkutimoj. Interŝanĝas per fotografaĵoj (sed neniam per poŝtmarkoj, papermonon ktp.). Mi interesiĝas pri salajroj, kondiĉoj de la laboro, profesiaj unuigoj kaj kulturkieriglaboro. [2]

S-o Aleksandro Tschiov, Petrograd, Znamenskaj ulica, N. 40, Rusujo, deziras korespondi Esperante kaj ĉiuj kun ĉiulandaj sinjoroj, precipe kun ekstereŭropaj, pri angl. temoj. [2]

Du fraŭlinoj-fratinoj el Rusujo deziras korespondi pri diversaj temoj kun eksteralandaj Esperantistoj-fraŭloj. F-inoj Heleno kaj Zinaida Kurdukov, B. Dmitrovska, N. 12, Moskva Klubo Esperantista, Moskva, Rusujo. [2]

Fraŭlo Jaime Navarra, Calabria 224, Barcelona, Hispanujo, deziras korespondi per pm., pk. kaj l. kun ĉiuj landoj. [2]

F-ino Rutte Holmberg, Veskra Kattarp, Malmö 7, Svedujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. pk. [2]

Fraŭlo Naiden R. Vasilev, 20-jara, libristo, Regenska ul. 45, Sofia, Bulgarujo, deziras havi rilatojn kun komercistoj de diversaj libroj. Korespondas kun gesamideanoj, precipe fraŭlinoj el ĉiuj landoj per il. pk. kaj l. [1]

Filatelistoj! Por 2 sv. fk. aŭ egalvaloro mi sendas 20 div. kaj originalajn monaĵojn de Germanujo, de Palatinata distrikto kaj de nia urbo. Interŝanĝas pm. ankaŭ papermonon. S-o Albert Jung, Kaiserslautern, Kanalstr. 20, Germ. [1]

S-o Izidor Grünberg, Bucureŝti, Rumanujo, str. Serban Voda 15, deziras korespondi kun Esperantistoj kaj Esperantistoj de la tuta mondo. [1]

S-o Paŭlo Grünberg, Bucureŝti, Rumanujo, str. Anton Pan 2, deziras korespondi kun gesperantistoj el ĉiuj landoj per pk. il. kaj l. [1]

S-o A. Ĉernjahovskij, Glavna 70, Sliven, Bulgarujo, deziras interŝanĝi pm. kaj il. pk. (bfl.) kun ĉiuj landoj. Fuŝsendaĵoj malakceptataj. Tuj respondas. [1]

S-o Otto Dietrich, Fürstenau 50, Post Lauenstein i. S., Germ., interŝanĝas pm. kaj papermonon kun ĉiuj landoj. [1]

S-o Anatoli Zdzanko, Studenecka 3, Nieswiez, Polujo, deziras korespondi kun la tuta mondo (per lito, rusio, Turkujo, Grekujo, Svedujo kaj Britujo) per il. pk., interŝanĝas pm. kaj papermonon. [1]